

CENTRE CULTUREL ESPERANTISTE

Agréé par le Ministère  
de l'Éducation Nationale  
Décret N° 66-6 du 24-7-1958

5, Quai Vauban  
PERPIGNAN  
(Pyrénées-Orientales)

NOUVELLE ADRESSE :

72, Av. Général de Gaulle  
Tél. 34-22-18 et 34-54-38

LES IMPRIMERIES GABELLE  
42, Rue Barbes, CARCASSONNE

COLETTE LLECH-WALTER

# héros existentialistes

dans l'Œuvre Littéraire  
DE J.-P. SARTRE

*TEXTE BILINGUE  
DE L'AUTEUR*

# ekzistencialistaj herooj

en la Literatura Verkaro  
DE J.-P. SARTRE





# héros existentialistes

dans l'Œuvre Littéraire  
DE J.-P. SARTRE

*TEXTE BILINGUE  
DE L'AUTEUR*

# ekzistencialistaj herooj

en la Literatura Verkaro  
DE J.-P. SARTRE



M. le Préfet ALBERT DUROCHER présente la Conférence  
(Hôtel des Sociétés Savantes) Perpignan

S<sup>m</sup> Préfeto ALBERT DUROCHER prezentas la prelegistionon  
(Domego de la Kleraj Asocioj) Perpignan

## ANTAŬPAROLO

---

*Oni diras ke unu el la plej malfacilaj artespri-  
moj por la skulptistoj estas modeli medalon, ĉar la  
diversaj imagoj, ekstarantaj en la menso de la  
aŭtoro, devas esti kuntenataj kaj limigitaj en la  
fiksita ronda spaco de la medalo, kiu estos bela  
se ne tro plena, aŭ ne tro malplena.*

*Simile estas la malfacilaĵo por la verkisto, kiu  
pretigas paroladon aŭ lecionon, kies daŭro estas  
tradicie fiksita en la tempo de preskaŭ unu horo,  
dum li havas antaŭ si vastan temon pritraktotan.*

*Prezenti la esencon de la penso de Sartre al  
eksterlandanoj, kiuj malmulte, aŭ tute ne, konas  
la verkojn de tiu aŭtoro, jen estis la malfacila  
tasko, al kiu F-ino Lech-Walter donis laŭdindan  
solvon per la parolado prezentita al Universala  
Esperanto-Kongreso de Marseille.*

*Ŝi sciis doni klaran ideon sufiĉan de la ĉefaj  
punktoj de la penso de la prezentita aŭtoro, kaj  
lasi en la aŭskultintoj la emon ekscii ion pli, eble  
per rekta legado de la cititaj verkoj.*

## PRÉFACE

---

L'une des plus difficiles expressions de l'art pour les sculpteurs est, dit-on, de modeler une médaille, car les diverses images surgissant de la pensée créatrice doivent être contenues et délimitées par l'espace rond déterminé de la médaille, qui sera belle, si elle n'est ni trop chargée de détails, ni trop sobre.

De même est la difficulté pour un auteur qui prépare un discours ou une leçon, dont la durée est fixée traditionnellement à un laps de temps d'une heure environ, pendant laquelle il se trouve en présence d'un vaste sujet à traiter.

Présenter la synthèse de la pensée de Sartre à des étrangers qui connaissent peu ou ne connaissent pas du tout les œuvres de cet auteur, telle était la tâche malaisée à laquelle M<sup>lle</sup> Colette LLECH-WALTER a donné une solution digne d'éloges, au moyen de la conférence présentée au Congrès Universel d'Esperanto de Marseille.

Elle a su fournir une idée claire, suffisante, des points principaux de la pensée de l'auteur présenté, et laisser, parmi ceux qui l'écoutaient, le désir de s'initier un peu plus, peut-être par la lecture dans l'original, des œuvres citées.

*Sed, tiu prelego ne havas nur tiun propran esencan valoron : ĝi estas atentinda ankaŭ pro la fakto, ke tiu malfacila filozofia temo estis pritraktata per la internacia lingvo, kio ebligis ke la vortoj de la parolantino estis samtempe bone komprenataj de homoj de almenaŭ 30 diversaj nacioj.*

*Kaj tio montras al la skeptikuloj, (kiuj opinias ke la internacia lingvo povas esti nur maltrafa jargono), ke ĝi, kontraŭe, kapablas esprimi perfekte ĉiujn nuancojn de la penso, necesajn por pritrakti tiun gravan filozofian temon.*

**Profesoro Giorgio CANUTO.**

Mais cette conférence n'a pas seulement cette valeur propre essentielle, elle est également digne d'attention par le fait même que ce délicat sujet était traité en Langue Internationale, ce qui a permis aux paroles de la conférencière d'être simultanément et parfaitement comprises de personnes d'au moins 30 nations différentes.

Et cela montre aux sceptiques (qui pensent que la langue internationale ne peut être qu'un jargon mal venu), qu'elle est, au contraire, apte à exprimer parfaitement toutes les nuances de la pensée, nécessaires pour traiter ce grave thème philosophique.

**Professeur Giorgio CANUTO.**



M. le D<sup>r</sup> GIORGIO CANUTO  
Ex-Recteur  
de l'Université de Parme  
Professeur d'Enseignement Supérieur  
à l'Université de Turin (Italie)

S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> GIORGIO CANUTO  
Eks-Rektoro  
de la Universitato de Parma  
Profesoro de Supera instruado  
en la Universitato de Torino (Italujo)

**LA EKZISTENCIALISTAJ HEROJ**  
EN LA  
**LITERATURA VERKARO DE SARTRE**  
de Colette LLECH-WALTER

*Tiun raporteton petis de mi la georganizintoj de la Internacia Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Marseille.*

*Ĝi estis destinata por alilandanoj, al kiuj la verkaro de Sartre estis ne-konata aŭ, almenaŭ ne-kutima.*

*Ne temis pri ellernado de « Ekzistencialismo », nek, despli prave, pri ekdiskuto koncerne la valoron de tiu filozofia skolo.*

*Mi ankaŭ ne intencis turni min al filozofiaj traktaĵoj tiel malfacilaj, nome: « Esto kaj Ne-esto », ekzemple.*

*Mi volis simple, provi esprimi kelkajn ĉefajn ideojn, kiuj tute speciale impresas dum la legado de la Sartra verkaro.*

*Tiucele, mi elektis ekzemplojn en la verkoj la plej taŭge alireblaj por la ne-ensekretigitaj personoj, tio estas en la romanoj, la noveloj kaj la teatraĵoj.*

*Unuvorte, mi precipe klopodis por doni al la ne-ensekretigitaj personoj la deziron sin okupi propramove pri la studado de la pensokapablo de Sartre, aŭ funde esplori la konon kiun jam ili povus havi pri tiu temo.*

**LES HÉROS EXISTENTIALISTES**  
DANS  
**L'ŒUVRE LITTÉRAIRE DE SARTRE**  
par Colette LLECH-WALTER

Cet exposé m'a été demandé par les organisateurs du Congrès International d'Esperanto, qui s'est tenu à Marseille.

Il s'adressait à des étrangers, auxquels l'œuvre de Sartre était inconnue, ou, du moins, peu familière.

Il ne s'agissait pas d'étudier l'Existentialisme d'une manière approfondie, encore moins d'engager une discussion sur la valeur de cette philosophie.

Je ne devais pas, non plus, me référer à des traités philosophiques aussi difficiles que « L'Être et le Néant », par exemple.

J'ai voulu simplement essayer de dégager quelques grandes idées, qui frappent particulièrement, à la lecture des œuvres de Sartre.

Pour cela, j'ai choisi des exemples, dans les ouvrages les plus accessibles aux non-initiés, c'est-à-dire, dans les romans, les nouvelles, les pièces de théâtre.

En un mot, j'ai surtout cherché à donner à des profanes le désir d'entreprendre, par eux-mêmes, l'étude de la pensée de Sartre, ou d'approfondir la connaissance qu'ils pouvaient en avoir.

## ENKONDUKO

*La plimulto el la personoj, kiuj uzas la vorton « Ekzistencialismo », estus certe en granda embarraso, se ili estus devigataj doni pri ĝi ekzaktan signifon. Laŭ ili, tiu termino envolvas doktrinon pli malpli skandalan, sed kiun ili tre malfacile difinus.*

*« Ekzistencialismo » fariĝis nun laŭmoda. Oni volonte asertas, ekzemple, ke muzikisto aŭ pentristo estas « ekzistencialisto ». Makulita, senzorgue vestita, konfuze malordigita kaj malafabla, ĉiufanken trenante sian naŭzon de kelo al kelo, kaj, malĝojega nokta kato, krurbaraktante laŭ barbaraj ritmoj, jen la stranga fenomeno kiun ekrevas renkonti duonebriaĵ eksterlandanoj kaj provincanoj en Parizo.*

*Efektive, post la milito, senokupaj gejunuloj, afekte montrante plenan nekonformismon, almenaŭ ŝajne, invadis Saint-Germain des Prés. — Ĉar, de longatempo, pro siaj literaturaj kafejoj, tiu kvartalo estis ofte frekventata de Sartre, oni povis esti ema similigi tiun novan modon al la ekzistencialisma filozofio.*

*Fakte, oni povus apenaŭ trovi rilaton, eĉ malgrava, inter tiu fenomeno kaj la unua stadio de la Sartra penso, ĵam transpaŝita tamen, tuj post la milito. — Sed, la neensekretigitaj personoj, opiniante ke ili vidas en la Keloj de « Saint-Germain-des-Prés », la ekzaktan rebrilon de la*

## INTRODUCTION

La plupart des gens qui utilisent le mot « *existentialisme* », seraient bien embarrassés s'ils devaient en donner une signification exacte ; ce terme recouvre pour eux une doctrine plus ou moins scandaleuse qu'il leur serait fort difficile de préciser.

L'existentialisme est une mode : l'on déclare, par exemple, volontiers, qu'un musicien, qu'un peintre est existentialiste. Crasseux et débraillé, hirsute et renfrogné, promenant sa nausée de cave en cave, et, triste chat de la nuit, gigotant sur des rythmes barbares, tel est le bizarre phénomène que rêvent de rencontrer étrangers et provinciaux en goguette à Paris.

En effet, après la guerre, une jeunesse oisive, affichant un non-conformisme total, tout au moins dans les apparences, envahit Saint-Germain des Prés. Parce que, depuis longtemps, à cause de ses cafés littéraires, ce quartier était fréquenté par Sartre, l'on a pu être amené à rapprocher cette nouvelle mode, de la philosophie existentialiste.

En fait, l'on pourrait, tout au plus, trouver une relation, encore fort mince, entre ce phénomène et la première étape de la pensée de Sartre, déjà dépassée pourtant, au lendemain de la guerre.

Mais, les profanes, croyant voir dans les caves de Saint-Germain des Prés, le reflet exact de la



ekzistencialisma filozofio, konfuze kunfandis en sia spirito « ekzistencialismo » kun « malbeleco », kaj kredis ke, esti ekzistencialisto konsistis, antaŭ ĉio, el la fakto insiste intensigi la malbonan flankon de la homa vivo. Kaj la ekzistencialistaro indignigis, naŭzis, skandalis...

Tamen, « Ekzistencialismo » estas eble la malplej skandala kaj la plej morigora el ĉiuj filozofiaj sistemoj. Ĉiuokaze, ni elektis ĝin kiel temon de nia nuna prelego, ĉar ĝi estas la filozofia sistemo kiu povas, kiel eble plej multe, interesi la homan estafon.

Efektive, tiu doktrino konsentas al la homa estajo egan gravecon, ĉar ĝi oficiale agnoskas ke ĉiu vero, ĉiu valoro devenas de la homo kaj nur de la homo. Tial, la plej verŝajna difino de la ekzistencialismo estas la difino mem de Sartre : « Ekzistencialismo estas Humanismo » : tio estas : « Kulto al la Homaro ».

Tamen, klarigi ekzakte « kio estas ekzistencialismo » ŝajnas al ni malfacile : ĉar ni havas antaŭ ni du dis-irantajn tendencojn : unupart, la kristanaj ekzistencialistoj, inter kiuj decas envicigi :

— la danon Kierkegaard, (de la jaro mil okcent dektria, ĝis la jaro mil okcent kvindek kvina), uzis la terminon « Ekzistencialismo » ;

— la francon Gabriel Marcel, Katolika, kiu naskiĝis en la jaro mil okcent okdek naŭa ;

— la germanon Karl Jaspers, kiu naskiĝis en la jaro mil okcent okdek tria, kiu, kvankam edukita en la Protestantismo, konfesas, ke li multan spiritan profiton ricevis el la katolikaro.

philosophie existentialiste, ont assimilé existentialisme à laideur, ont cru qu'être existentialiste, c'était, avant tout, mettre l'accent sur le mauvais côté de la vie humaine ; et l'univers existentialiste a indigné, écoeuré, scandalisé...

Or, l'existentialisme est peut-être la philosophie la moins scandaleuse et la plus austère qui soit ; en tous cas, si nous avons choisi de l'étudier ici, c'est parce que ce système est, à notre avis, le plus susceptible d'intéresser l'homme.

Cette doctrine en effet accorde à l'être humain une importance immense, puisqu'elle reconnaît, comme nous le verrons dans le courant de notre exposé, que toute vérité, que toute valeur émane de l'homme et de l'homme seul.

Aussi, la définition la plus valable de l'existentialisme, nous paraît être celle qu'en donne Sartre lui-même : « L'existentialisme est un humanisme », l'on pourrait dire, un culte de l'humanité.

Pourtant, expliquer exactement ce qu'est l'existentialisme, nous semble difficile : c'est que l'on se trouve en présence de deux courants divergents : d'une part, les existentialistes chrétiens, parmi lesquels il faut ranger :

— le Danois Kierkegaard (1813-1855), élevé dans le protestantisme, qui employa pour la première fois le terme « existentialisme » ;

— le Français Gabriel Marcel, né en 1889, de confession catholique ;

— l'Allemand Karl Jaspers, né en 1883, qui, bien que de formation protestante, reconnaît avoir beaucoup reçu du monde catholique.

*Aliparte, la ateistaj ekzistencialistoj, kies ĉefaj pioniroj estas :*

— *la germano Heidegger, kiu naskiĝis en la jaro mil okcent okdek naŭa,*

— *kaj la francaj ekzistencialistoj nuntempaj, Sartre, Simone de Beauvoir, Merleau-Ponty.*

*Kompreneble, ni povas nek ellerni plendetale tiujn diversajn doktrinojn kun iliaj propraj karakterizaĵoj, nek doni, tiamaniere, kompletan panoramon de la « Ekzistencialismo ».*

*Ŝajnis al ni interese limigi nin, inter la filozofoj, al tiu kiun oni konsideras en Francujo kiel la vera pioniro de la ekzistencialismo, al tiu ankaŭ, kies verkaro okazigis la plej grandan indignon, Johano-Paŭlo Sartre. — Aliparte, oni povas konsideri tute prave Sartre kiel la teoriiston de la ateistaj ekzistencialistoj.*

*Plie, alia kialo gvidis nin en la elekto de tiu filozofo. De longatempo, la celo de la filozofio ŝajnis malproksimiĝi kiel eble plej multe de la vivo kaj fariĝis, tiamaniere paradoksa kaj neutila. Oni opiniis ĝenerale ke estas eble trovi veran filozofion, nur en pezaj traktaĵoj plenaj de subtila dialektiko.*

*Jen, de kelkaj jaroj, la filozofo fariĝis homo ; li fariĝis estaĵo en la mondo ; la filozofio estas ne plu rezervita al eta nombro de ensekretigitaj personoj.*

*Sartre sukcesis, tiamaniere, komuniki al la homoj sian doktrinon, tute rekte ; en verkoj de imago, noveloj, teatraĵoj ; lia filozofio estas precize formulita, okaze de incidentoj de la ĉiutaga vivo. Kaj*

D'autre part, les existentialistes athées, dont les principaux représentants sont :

— l'Allemand Heidegger, né en 1889 ;

— et les existentialistes français contemporains : Sartre, Simone de Beauvoir, Merleau-Ponty.

Il est bien évident que nous ne pouvons pas étudier en détails ces diverses doctrines avec leurs caractéristiques particulières, ni donner ainsi une vue complète de l'existentialisme.

Il nous a donc paru intéressant de nous limiter à celui de ces philosophes qui est considéré en France, comme le véritable représentant de l'existentialisme, celui aussi, dont les œuvres ont soulevé le plus d'indignation : Jean-Paul Sartre. C'est d'ailleurs à juste titre, que l'on peut voir en Sartre le théoricien de l'existentialisme athée.

De plus, une autre raison nous a guidée dans le choix de ce philosophe. Depuis longtemps, l'objet de la philosophie semblait s'éloigner le plus possible de la vie, et devenait ainsi, paradoxal et inutile. L'on croyait ne pouvoir trouver de la philosophie véritable, que dans de lourds traités emplies de subtile dialectique.

Or, depuis quelques années, le philosophe s'est fait homme, il est devenu un être dans le monde ; la philosophie a cessé d'être réservée à un nombre restreint d'initiés.

Sartre est ainsi parvenu à communiquer aux hommes sa doctrine, d'une façon directe ; dans des ouvrages d'imagination, tels que romans et pièces de théâtre, sa philosophie est expressément formulée à propos d'incidents de la vie

tiuj personoj ne estas senagaj stud-estajoj, kiuj ankoraŭ bezonus klerajn komentariojn de kritikistoj. Ili mem esprimas sian propran signifon; ili-mem diras ĉion, kio estas direnda, kaj ĉion kio estas dirinda pri si. Sartre detruas la tradician intervandon kiu apartigis la literaturon de la filozofio, kaj kreis tiel, novan manieron: t-e.: la filozofia literaturo.

Tial, ni ne klopodis raporti laŭ teknika maniero la suman filozofion de Sartre.

Ni volis nur detale pririgardi tion kion povas konservi en memoro pri tiu doktrino, la leganto de la literatura verkaro de Sartre.

Unuvorte, ni ekprovos klarigi la Sartran filozofion pere de la Herooj mem de liaj verkoj.

Tamen, ĝisfunda studado de tiuj personoj estus tro longa, kaj emus fariĝi laciga.

Ni limigos nin preferinde prezenti unu solan sed tipan heroon por ilustrati ĉiun apartan gravan ideon.

Ni elektos niajn ekzemplojn:

- en la teatraĵoj: « La Muŝoj »,  
« Malpublikeco ».
- en la noveloj: « La Ĉambro », « Erostrato ».  
« Infanjaroj de Estro ».
- en la romano: « La Naŭzo ».

quotidienne. Et ces personnages ne sont pas de passifs sujets d'étude, qui auraient encore besoin de commentaires éclairés de critiques; ils expriment eux-mêmes leur signification, ils disent eux-mêmes tout ce qu'ils ont à dire, et tout ce que l'on peut dire d'eux. Sartre détruit la traditionnelle cloison qui séparait la littérature de la philosophie, et a créé ainsi un nouveau genre: la littérature philosophique.

Aussi, n'avons-nous pas cherché à exposer d'une manière technique, la philosophie de Sartre dans son ensemble.

Simplement, nous avons voulu examiner ce que peut retenir de cette doctrine, le lecteur des œuvres littéraires de Sartre.

En un mot, nous essayerons de faire exposer la philosophie de Sartre, par les héros mêmes de ses ouvrages.

Cependant, une étude exhaustive de ces personnages serait beaucoup trop longue et risquerait de devenir lassante.

Nous nous bornerons plutôt à présenter, pour illustrer chaque grande idée particulière, un seul héros significatif.

Nous choisirons nos exemples:

- dans les pièces de théâtre: *Les Mouches*,  
*Huis clos*.
- dans les nouvelles: *La Chambre*, *Erostrate*,  
*L'Enfance d'un Chef*.
- dans le roman: *La Nausée*.

## UNUA PARTO

---

*Antaŭ ol ni komencos nian raporton, ni volus insisti pri ĉefa punkto : oni riproĉis al la Sartra verkaro esti plena je malvirtaj kaj senenergiaj agadoj ; Sartre estas ja nur en la unua parto de sia filozofia verko ; li ankoraŭ ne skribis moralinstruon ; li preparas la terenon, aperigas la necesajn kondiĉojn. Li ne ordonas, li priskribas.*

*Tamen, la diversaj elementoj de la verko de Sartre konverĝas al morala celo.*

*Sartre volas ke lia filozofio estu vera humanismo, tio estas ke, anstataŭ ol celi dronigi la homan estaĵon en la malesperon, kiel ofte oni opinias, li kredas povi en la homon solan enmeti sian tutan esperon.*

*Sed, la plej grava parto de la homoj estas timigitaj de tiu integrala humanismo, kaj provas ĝin eviti. En sia « malsincereco », laŭ la termino mem de Sartre ili starigas barojn al tiu glorado de la homa estaĵo. Ili troviĝas tiam en stato kiun Sartre nomas « viskoz-malsano », tio estas, ili pendole balanciĝas inter la situacio de kruda estaĵo, de objekto, kaj la libereco.*

*Tial, Sartre penados priskribi tiun « viskozan » staton en kiu sin plaĉas la plimulto de la homoj.*

## PREMIERE PARTIE

---

Nous voudrions, avant de commencer notre exposé, insister sur un point essentiel : l'on a reproché aux ouvrages de Sartre d'être remplis d'actes vicieux et veules ; c'est que Sartre n'en est qu'à la première partie de son œuvre philosophique ; il n'a pas encore écrit une morale ; il prépare le terrain, dégage les conditions nécessaires. Il ne prescrit pas, il décrit.

Pourtant, les divers éléments de l'œuvre de Sartre convergent à un but moral.

Sartre veut faire de sa philosophie un humanisme véritable, c'est-à-dire que, loin de chercher à plonger l'être humain dans le désespoir, comme on le pense souvent, il croit pouvoir placer tout son espoir en l'homme seul.

Mais la plupart des hommes sont effrayés par cet humanisme intégral et essayent de le fuir. Dans leur « mauvaise foi », selon le terme même de Sartre, ils dressent des obstacles à cette glorification de l'être humain ; ils se trouvent alors dans une situation que Sartre appelle la « viscosité », c'est-à-dire, qu'ils oscillent entre la situation d'existant brut, de chose, et la liberté.

Aussi, Sartre va-t-il s'appliquer à décrire cet état visqueux, dans lequel se complaisent les hommes, en grande majorité.

*Sed li studos ankaŭ, tra aliaj personoj, la batalon kiun subtenas kelkaj homoj por ekaperi el la situacio de « objekto » en kiu ili mem estas mal-liberaj.*

*Sartre, fine, montros pere de kelkaj el siaj herooj, kiamaniere la homa estaĵo povas kelkfoje eltrovi vivon aŭtentike homan.*

*Tiaj estos ankaŭ la diversaj stadioj de nia raporto. Tia estos la vojo sur kiu ni sekvos la heroojn de Sartre.*

*Ni do detale pririgardadu la diverstipajn barojn, kiujn la homo mem starigas kontraŭ vera humanismo.*

*Unue, laŭ kelkaj personoj, iu signifo estus donita de ĉiam al la mondo, kaj tute speciale al la homoj, devenante de potenco supera al la homa estaĵo, tiu signifo okazigus pravigadon de la homa ekzistado ĉar la homo scius kion ĝi signifas, ĝi scius ankaŭ kial ĝi ekzistas.*

*Plie, la valoro estus starigita absolute : obeenda moralo troviĝus fiksita por ĉiuj homoj kaj ebligus al ili efektiviĝi la celon por kiu oni estus kreinta ilin.*

*Tiun vidpunkton persiste defendas la tradicia filozofio, jam de post Platono, kiam ĝi konceptas dion-kreinton similigitaj al supera verkisto.*

Mais il étudiera aussi, à travers d'autres personnages, la lutte que mènent certains êtres humains, pour émerger de la situation de « chose » à laquelle ils se sont eux-mêmes réduits.

Sartre, enfin, montrera, par l'intermédiaire de quelques-uns de ses héros, comment l'homme peut, parfois, découvrir une vie authentiquement humaine.

Telles seront aussi, les différentes étapes de notre exposé ; telle sera la voie dans laquelle nous suivrons les héros de Sartre.

Examinons donc, tout d'abord, les différents obstacles que l'homme dresse lui-même contre un véritable humanisme.

En premier lieu, selon certaines personnes, une signification serait donnée au monde, et, en particulier, aux hommes, depuis toujours, par une puissance supérieure à l'être humain. Cette signification entraînerait une justification de l'existence de l'homme : puisque l'homme saurait ce qu'il signifie, il saurait aussi pourquoi il existe.

De plus, la valeur serait établie d'une manière absolue, une morale à suivre se trouverait fixée pour tous les hommes et leur permettrait de réaliser le but pour lequel ils auraient été créés.

C'est ce que soutient la philosophie traditionnelle depuis Platon, lorsqu'elle conçoit un Dieu créateur, assimilé à un artisan supérieur.

Same, kiam verkisto volas krei objekton, la ideo de la farota objekto sin prezentas al lia spirito kaj antaŭas la kreadon de tiu objekto, same, en la spirito de Dio, la ideo, la koncepto de la homo antaŭas la kreadon de la homo.

Tiun vidmanieron oni esprimas kiam oni diras ke la esenco antaŭas la ekziston.

Tiam, la moralo, absolute starigata por ĉiuj devas celi al la efektivigo de tiu koncepto de la homo kiu troviĝas en la spirito de Dio.

En la komuna vivo, tiu sintenado evidentiĝas per absoluta obeo al dio.

Ni konsideru la teatraĵon titolitan « La Muŝoj ». Sartre prezentas al ni la enloĝantojn de urbeto de Greklando « Argos ». Ili ĉiuj honoras Jupiter kaj obeas al li sendiskute. Ili evitas tiel pripensadi, ili liberigas sin de ĉiu sento de individua prirespondeco. Fakte, sekvante eksteran estrecon, ili serĉas la forgeson, la ripozon. Jupiter mem diras parolante pri la homoj : « Estas necese ke ili min rigardu ; tiom longe ili havos la okulojn fiksitaj al mi, tiam ili forgesos rigardi en si-mem » (p. 78).

Sartre nomas tiun staton de la homaj estaĵoj kiuj la prirespondecon forfuĝas, la « malsincereco ». En « Argos », ĝi estas konservata de Jupiter kaj de la reĝo Egisto, kiuj konas « la doloran sekreton de la dioj kaj de la reĝoj : tio estas, ke la homoj estas liberaj... kaj tion ili ne scias... Se tion ili sciis, ili ekbruligus la kvar angulojn de mia palaco. Jen, de dekkvin jaroj, mi komedias por kaŝi al ili ilian povon », diras Egisto (p. 77).

De même que, lorsqu'un artisan veut créer un objet, l'idée de l'objet à faire se présente à son esprit et précède la création de cet objet, de même, dans l'esprit de Dieu, l'idée, le concept d'homme précéderait la création de l'homme.

L'on exprime cette notion, lorsque l'on dit que l'essence précède l'existence.

Alors, la morale, établie d'une manière absolue pour tous, doit viser à réaliser ce concept de l'homme qui se trouve dans l'esprit de Dieu.

Dans la vie courante, cette attitude se traduit par une obéissance absolue à un Dieu.

Considérons la pièce de théâtre intitulée « Les Mouches ». Sartre nous présente les habitants d'une petite ville de Grèce, Argos. — Ils honorent tous Jupiter, et lui obéissent sans discuter. Ils évitent ainsi de réfléchir, ils se dégagent de tout sentiment de responsabilité individuelle : en fait, ce qu'ils recherchent, en suivant une autorité extérieure, c'est l'oubli, le repos. — Jupiter dit lui-même en parlant des hommes : « Il faut qu'ils me regardent : tant qu'ils ont les yeux fixés sur moi, ils oublient de regarder en eux-mêmes » (p. 78).

Cet état des êtres humains qui fuient la responsabilité, Sartre l'appelle la *mauvaise foi*. Elle est entretenue dans Argos par Jupiter et par le roi Egisthe, qui connaissent « le secret douloureux des Dieux et des rois : c'est que les hommes sont libres »... « et ils ne le savent pas... s'ils le savaient, ils mettraient le feu aux quatre coins de mon palais. Voilà quinze ans que je joue la comédie pour leur masquer leur pouvoir », dit Egisthe (p. 77).

*Kaj li aldonas aliparte :*

*« Homo libera en urbo estas komparinda kun skabia ŝafino en brutaro » (p. 79).*

*Tial, por subteni la ordon, dio kaj reĝo dronigis la homojn en kolektivon hipnoton, kiu emas ilin penti pri aliula kulpo.*

*Efektive, antaŭ dekkvin jaroj, la reĝon Agamemnon mortigis lia edzino « Clytemnestre » kaj la nuntempa reĝo Egisto.*

*La enloĝantoj de « Argos » konsideras tiam la krimon de sia reĝo kiel sian propran krimon, kaj sin dediĉas al kolektivaj konscienc-riproĉoj kiuj kaŝas al ili mem ilian individuan liberecon.*

*Kaj Jupiter konfesas : « Jes, plaĉas al dioj tiuj kompatemaj animoj » (p. 20).*

*Plie, la homaj estaĵoj ne volas konsenti pri la fakto ke oni disĵetis ilin en la mondon, hazarde, sen iu ajn kialo ekzisti.*

*Ili ŝatus scii ke ili estas kreitaj por ludi rolon, por plenumi precizan mision.*

*Tial, laŭ ili, Dio pravigus ilian ekzistadon kaj donus al ili la ekzistorajton.*

*La filo de la mortinta reĝo Agamemnon, Oresto, pri kiu ni baldaŭ denove parolos, precizigas tiun sintenadon, kiam li diras al Jupiter :*

*« Vi estis mia ekzist-pravigo, ĉar vi naskis min por servi viajn planojn » (p. 100).*

*Aliaj homoj, sed ni ne povas ĉi-tie detale prezenti ĉiujn ekzemplojn, forkuras de la libereco, rifuĝante al kredo en « determinismo ». Ili opinias ke la homaj estaĵoj estas antaŭe fiksitaj, de sia*

Et il ajoute ailleurs :

*« Un homme libre dans une ville, c'est comme une brebis galeuse dans un troupeau » (p. 79).*

Aussi, pour maintenir l'ordre, le dieu et le roi ont-ils plongé les hommes dans une hypnose collective qui les fait se repentir de la faute d'autrui.

Il y a quinze ans, en effet, le roi Agamemnon a été tué par sa femme Clytemnestre et par l'actuel souverain, Egiste.

Les habitants d'Argos prennent alors le crime de leur roi pour leur propre crime, et s'abandonnent à des remords collectifs qui leur masquent leur liberté individuelle.

Et Jupiter avoue : « Oui, elles plaisent aux Dieux, ces âmes pitoyables » (p. 20).

De plus, les êtres humains ne veulent pas avoir été jetés dans le monde, au hasard, sans aucune raison d'exister.

Ils aimeraient se savoir créés pour jouer un rôle, pour remplir une mission précise.

Aussi, selon eux, Dieu justifierait leur existence, et leur donnerait le droit d'exister.

Le fils du roi défunt Agamemnon, Oreste, dont nous aurons à reparler bientôt, précise cette attitude, lorsqu'il dit à Jupiter : « Tu étais mon excuse d'exister, car tu m'avais mis au monde pour servir tes desseins » (p. 100).

D'autres hommes, mais nous ne pouvons pas exposer ici tous ces cas en détails, fuient la liberté, en se réfugiant dans la croyance au déterminisme : ils pensent que les êtres humains

korpo, sia temperamento, la socio en kiu ili estis edukataj, la influoj kiujn ili spertis... kaj ili, tiamaniere evitas la prirespondecon de siaj agadoj.

Sed ekzistas sintenado de « malsincereco » ankoraŭ pli interesa por studi. Temas, pri tiuj kiuj obeas viv-daŭre al la decidoj de aliuloj.

La homo kiu volas forfuĝi el si mem, fakte rifuĝos ofte en la homamason, kie ĝi povos plej favore maldensigi sian propran prirespondecon inter la aliuloj kaj fariĝi anonimulo.

Ĝi intime miksiĝos en tutaĵo, tie trovos lokon, tio estas ĝi certigos la funkciadon de posteno en la socio kaj kiel asertas Campbell en studaĵo pri Sartre (p.201), « li sin dediĉos al sia tasko ne laŭ la persona maniero de « MI », sed laŭ tiu tute nepersona de « ONI », de « IU AJN ». Ĝi obeas al la truddevigoj de la Socio, same kiel la aliuloj, ne provante diskuti aŭ altrudi siajn proprajn vidpunktojn.

Sartre nomas tiun elekton de la ekzistado en mondo kiu dronigas la personecon, « spirito de seriozeco », kaj li nomas « senenergiuloj » tiujn kiuj eniĝas en tiu « ne-aŭtentika » fako.

En la novelo « Infanĵaroj de Estro », ni ĉeestas la metamorfozon de Lucien Fleurier. Jen li estas forlasante siajn solecajn meditadojn, la longegajn kialojn pri si mem, pri sia juneco, por eniri la vojon de la « malsincereco ».

sont déterminés à l'avance, par leur corps, leur tempérament, la société dans laquelle ils ont été élevés, les influences qu'ils ont subies, et ils se dérobent ainsi à la responsabilité de leurs actes.

Mais, il existe une attitude de *mauvaise foi* encore plus intéressante à étudier. Il s'agit de ceux qui obéissent perpétuellement aux décisions d'autrui.

L'homme qui veut échapper à lui-même, se réfugie en effet souvent dans la foule, où il pourra, le plus facilement, diluer sa responsabilité sur les autres, et devenir un être anonyme.

Il va s'intégrer dans un tout, y trouver une place, c'est-à-dire qu'il assurera un poste dans la société, et, comme le dit Campbell, dans une étude sur Sartre (p. 201). il se consacrera à sa tâche, « non pas sur le mode personnel du « Je », mais sur celui, tout impersonnel du « On », du « N'importe qui ». Il obéira aux impératifs de la Société, comme tout le monde, sans essayer de discuter ou d'imposer ses propres vues.

Sartre appelle ce choix de l'existence dans un monde qui noie la personnalité, « l'esprit de sérieux » et il nomme « lâches » ceux qui pénètrent dans ce domaine inauthentique.

Nous assistons, dans la nouvelle « L'enfance d'un Chef », à la métamorphose de Lucien Fleurier : le voici quittant ses méditations solitaires, les interminables questions sur lui-même de son adolescence, pour entrer dans la voie de la *mauvaise foi*.



*Li baldaŭ anstataŭos la patron je la direktoreco de lia uzino, kaj persiste li agos same kiel agis la patro, la avo, kaj ĉiuj antaŭaj direktoroj de uzino.*

*Li sekvos unu antaŭe montritan vojon kaj tiamaniere, sin forsavos el la prirespondeco de la « libera elekto ».*

*Plie, ĉar li vidas sin destinita por ludi rolon, li opinias ke, pro tio mem, la ekzistad-raĵto estas donata al li. Li do ne estis kreata hazarde, sed li naskiĝis (laŭ sia opinio), por fariĝi estro. Kaj li sentas sian ekzistadon pravigata.*

*Li rekunigas tiamaniere, la sintenadon de multaj homoj kiujn estas perfekte persvadataj pri la graveco de sia misio en la socio kaj kiujn Sartre nomas « La Naŭzantoj ».*

*Ĉe la fino de la novelo, Fleurier komunikas al la leganto siajn rimarkojn :*

*« Dum longa tempo, li kredis ke li ekzistas hazarde, sendirekte, sed li tiel opiniis, ĉar li ne sufiĉe pripensis. Longe antaŭ lia naskiĝo, jen lia loko estis jam markita sub la suno ».*

*« Jam, eĉ longe antaŭ la edziĝo de lia patro, oni atendis lin. Se li estis alveninta en la mondon, estis por okupi tiun lokon : « Mi ekzistas, li pensis, ĉar mi havas la rajton ekzisti » (p. 244).*

*Jen do la « malsinceraj homoj ». Ili estas persvadataj ke ili agas prave ; multaj el ili eĉ opinias ke ili estas liberaj homoj, sed ilia spirito estas trompita ; ili rezigniĝis ja la veran liberecon.*

Il va remplacer son père à la direction de son usine, et il continuera à agir comme l'ont fait son père, son grand-père et tous les directeurs d'usine qui l'ont précédé.

Il suivra un chemin tracé d'avance et échappera ainsi à la responsabilité du libre-choix.

De plus, puisqu'il se voit appelé à jouer un rôle, il croit que, par là-même, le droit d'exister lui est conféré. Il n'a donc pas été créé par hasard, mais il est né, s' imagine-t-il, pour devenir un chef. Et il sent son existence justifiée.


Il rejoint ainsi l'attitude de beaucoup d'hommes qui sont parfaitement persuadés de l'importance de leur mission dans la société, et que Sartre appelle les « Salauds ».

A la fin de la nouvelle, Fleurier livre ses réflexions au lecteur :

« Il avait longtemps cru qu'il existait par hasard, à la dérive ; mais, c'était faute d'avoir assez réfléchi. Bien avant sa naissance, sa place était marquée au soleil. »

« Déjà, bien avant le mariage de son père, on l'attendait ; s'il était venu au monde, c'était pour occuper cette place. J'existe, pensa-t-il, parce que j'ai le droit d'exister » (p. 244). ,

Voilà donc les hommes de « mauvaise foi » ; ils sont persuadés qu'ils agissent avec raison ; pour la plupart, ils s'imaginent même être libres ; mais leur esprit est abusé ; ils ont, en fait, renoncé à la véritable liberté.



M. le Commandant Eugène DEVAUX  
Doyen de la Société Agricole, Scienti-  
fique et Littéraire des Pyrénées-Orientales,  
s'entretient avec la Conférencière.

S<sup>mo</sup> Majoro Eugène DEVAUX, Dekano  
de la Societo Agrikultura, Scienca kaj  
Literatura de la Orientaj Pireneoj, inter-  
parolas kun la prelegistino.

## DUA PARTO

*Kelkfoje, tamen, iuj konstatas la « ne-aŭtentikecon » de la ĉiutaga ekzistado, kaj batalas por ne fali en la « viskoz-malsanon ».*

*Ĉu ne okazis al vi rigardadi vin en spegulo, kaj tiam, ne plu vidi vian vizaĝon, sed karnamason kies signifon vi ne komprenis plene ?*

*Ĉu vi neniam konsideris objekton kiel senforman amason kies utileco kaj vera ekzist-kialo estis fine dubaj por vi ?*

*Tia estas la sperto kiun faras Roquentin en « La Naŭzo ». Laŭ li, la signifo kiun la homoj donas al la objektoj estas laŭkaprica kaj senmerita. La objektoj konsistigas « originan haŭson », meze de kiu homo estas fremdulo.*

*Tial, ĉiufoje kiam li vidas objekton, li ne povas agi aliamaniere ol senigi ĝin je ia ajn racia signifo, kaj ĝin konsideri en ĝi mem, kiel estajo kruda, absurda, « senhumanigita ».*

*Jen li estas en kafejo, sidante sur remburita benko ; sed, kio estas benko, kiam oni ne plu konsideras ĝin kiel sidilon ? « Ĝi restadas kio ĝi estas, kun sia ruĝa pluŝo, miloj da etaj ruĝaj (insekt-)piedetoj supren, ĉiuj rigidaj, etaj mortintaj piedetoj. Tiu grandega « ventro » suprenrigardanta, sangoplena, ŝveligita... » (p. 159).*

## DEUXIEME PARTIE

Parfois, cependant, certains hommes se rendent compte de l'inauthenticité de l'existence quotidienne, et luttent pour s'empêcher de tomber dans la « viscosité ».

Ne vous est-il pas arrivé de vous regarder dans une glace et de ne plus voir votre visage, mais un amas de chair dont vous vous demandiez ce qu'il signifiait réellement ?

N'avez-vous jamais considéré un objet comme une masse informe dont vous finissiez par douter de l'utilité et de la véritable raison d'être ?

Telle est l'expérience que fait Roquentin dans « La Nausée » ; d'après lui, la signification que les hommes donnent aux choses, est arbitraire et gratuite ; les objets forment un *chaos originel*, au milieu duquel l'homme est un étranger.

Aussi, ne peut-il plus s'empêcher, lorsqu'il voit un objet, de le dépouiller de toute signification rationnelle, et de le considérer, en lui-même, comme un existant brut, absurde, « *déshumanisé* ».

Le voici au café, assis sur une banquette ; mais, qu'est-ce qu'une banquette, lorsqu'on ne la considère plus comme un instrument qui sert à s'asseoir : « elle reste ce qu'elle est, avec sa peluche rouge, milliers de petits pattes rouges en l'air, toutes raides, de petites pattes mortes. Cet énorme ventre tourné en l'air, sanglant, ballonné... » (p. 159).

Aŭ, li estas sur publika ĝardeno, kaj admire rigardadas radikon de maronarbo.

« Mi ne plu memoris ke tio estas radiko. La vortoj estis jam forflugintaj, kaj kun ili, la signifo de la objektoj, la uz-maniero, la malfortaj gvidsignoj kiujn la homoj desegnis sur la supraĵo. Mi sidis, iome dorskurba, havante la kapon malalta, sola antaŭ tiu amaso nigra kaj tubera, tute kruda kaj kiu timigis min » (p. 161).

Plie, kiam, en la spirito de homo, la objektoj perdas sian signifon, ili perdas samtempe la kialon mem de sia ekzistado; ili estas sen iu ajn logika neceso, sen iu ajn utileco; ili havas neniun rolon por ludi. Kaj Roquentin rimarkigas: « Ni estis multaj ekzistantaj estaĵoj, ĝenataj, embarasplenaj pri ni mem. Ni ne havis eĉ malgrandan kialon esti tie nek unuj, nek la aliaj; ĉiu ekzistantanta estaĵo, konfuza, nedefinite malkvieta, sentis sin superflua rilate al la aliaj. Vere superflua! » (p. 163).

Aliparte, Roquentin, dum siaj longaj momentoj de mal-laboremo, similigas ankaŭ sian korpon al la krudaj ekzistantaĵoj. Li senigas ĝin de la signifo kiu al ĝi donas la homoj, kaj vidas ĝin kiel objekton meze de la objektoj, absurdaĵon. Jen li estas rigardante sin en spegulo: « Tio kion mi vidas estas multe pli malsupre ol simio, ĉe la rando de la vegetala mondo, ĉe la nivelo de la polipoj... mi vidas karmon naŭze malagrabra kiu disvolviĝas kaj tremetas malzorgate. La okuloj, precipe viditaj de tiel proksime, estas hororaj. Tio estas vitreca, mola, blinda, borderita per ruĝa koloro, tio tre similas al skvamoj de fiŝo » (p. 31).

Ou bien, il est dans un jardin public, et il contemple une racine de marronnier.

« Je ne me rappelais plus que c'était une racine. Les mots s'étaient évanouis, et, avec eux, la signification des choses, leurs modes d'emplois, les faibles repères que les hommes ont tracé à la surface. J'étais assis, un peu voûté, la tête basse, seul en face de cette masse noire et noueuse, entièrement brute, et qui me faisait peur » (p. 161).

De plus, lorsque, dans l'esprit d'un homme, les choses perdent leur signification, elles perdent en même temps, leur raison d'exister, elles sont sans aucune nécessité logique, sans aucune utilité, elles n'ont aucun rôle à remplir. Et Roquentin remarque: « Nous étions un tas d'existants, gênés, embarrassés de nous-mêmes, nous n'avions pas la moindre raison d'être là, ni les uns ni les autres; chaque existant, confus, vaguement inquiet, se sentait de trop, par rapport aux autres. De trop! » (p. 163).

C'est que, Roquentin, dans ses longs moments d'oisiveté, assimile aussi son corps aux existants bruts: il le dépouille de la signification que lui donnent les hommes, et il le considère comme une chose au milieu des choses, un objet absurde. Le voici se regardant dans une glace: « Ce que je vois est bien au-dessous du singe, à la lisière du monde végétal, au niveau des polypes... je vois une chair fade qui s'épanouit et palpite avec abandon. Les yeux surtout, de si près, sont horribles. C'est vitreux, mou, aveugle, bordé de rouge; on dirait des écailles de poisson » (p. 31).

Tiam, ankaŭ la homo perdas ĉiujn motivojn pri sia ekzistado : « Ankaŭ mi estis superflua... mi estis superflua je la eterneco !... » (p. 163).

« ...Ĉio estas senvalora, tiu ĝardeno, tiu urbo, kaj mi mem... jen tio kion la « naŭzantoj »... ekprovas kaŝi al si, per siaj ideoj de rajto. Sed kian kompatindan mensogon ! Neniu havas rajton. Ili estas tute senvaloraj, kiel la aliaj homoj » (p. 167).

Roquentin malkovras tiel, gravan ideon de Sartre. La homoj estas kreitaj tute hazarde ; ili estas « ne pravigeblaj ».

Roquentin komprenis do ke rifuĝi en la « serioza spirito » estas elmontri « malsincerecon ».

Sed, ĉu li sukcesos alpreni aŭtentikan sintendon ?

Por fuĝi la materialcon de la objektoj, li sin dediĉas baldaŭ al la Artoj, la solaj aĵoj kiuj laŭ sia opinio estas « pravigitaj ». La Muziko ekzemple, estas kreita de la homo por esprimi difinitan signifon, kaj ĝi ne havas alian ekzistadon krom tio kion ĝi signifas. Ĝi sola kapablas laŭŝajne eltiri Roquentin el lia naŭzo.

Ni ne scias kia estos, poste, la sorto de Roquentin, sed ni opinias ke li ne povis vivi eterne en la sento de sia pravigado. Fantazia kredo estas nur ne-daŭra rifuĝejo. La reala vivo estas tie, kaj ĝi realtiras nin al si.

Oni povas timi ke tiu ŝanco de savo estos nur provizora rimedo, kaj ke Roquentin troviĝos sufiĉe rapide invadita denove per tiu naŭza sento kiun li spertas antaŭ la homoj.

Alors, l'homme aussi perd toute raison d'exister : « Moi aussi, j'étais de trop... j'étais de trop pour l'éternité » (p. 163). « ...Tout est gratuit, ce jardin, cette ville et moi-même... voilà ce que les salauds essaient de se cacher, avec leur idée de droit. Mais, quel pauvre mensonge : personne n'a le droit ; ils sont entièrement gratuits, comme les autres hommes » (p. 167).

Roquentin découvre ainsi une idée importante de Sartre : les hommes ont été créés par hasard, ils sont « injustifiables ».

Roquentin a donc compris que se réfugier dans l'esprit de sérieux c'était faire preuve de « mauvaise foi ».

Mais, parviendra-t-il à adopter une attitude authentique ?

Pour fuir la matérialité des objets, il va se mettre aux arts, les seules choses qui, selon lui, soient « justifiées » ; la musique, par exemple, a été créée par l'homme pour exprimer une certaine signification, et elle n'a d'autre existence que ce qu'elle signifie ; elle seule semble pouvoir libérer Roquentin de sa nausée.

Nous ne savons pas quel sera, par la suite, le destin de Roquentin, mais nous pensons qu'il n'aura pas pu vivre éternellement dans le sentiment de sa justification ; l'imaginaire n'est qu'un refuge temporaire. La vie réelle est là, qui nous rappelle à elle.

L'on peut craindre que cette chance de salut soit seulement un expédient, et que Roquentin se trouve assez vite envahi de nouveau par ce sentiment de « nausée » qu'il éprouve devant le monde.

*Ni povas efektive tiamaniere prijuĝi, apogante nin sur alia novelo de Sartre « La Chambre ».*

*Ni vidas tie, junan virinon kiu pro amo al sia edzo malsana volas lin sekvi en tia deliro, kaj rifuĝi tiel ekster la homa stato, en la fantazio. Sed ĉi malsukcesos, kaj ŝi devas konfesi: « Tio estis nur ludo; ĉe dum unu momento, mi ne kredis tion sincere ».*

*Estas alia situacio, en kiu, klarvidaj estajoj sentas sin similigitaj al la krudaj ekzistantoj kaj elrimarkas kiel la vivo estas ne-aŭtentikaĵo; tio estas kiam ili troviĝas antaŭ la aliula rigardado.*

*Mi konsideras min fakte, ĉiam kiel projekton, kiel estajojn destinitajn por plenumi ĉiam novajn agojn, krei senfine sian vivon; laŭ mi, miaj pasintaj jaroj ne povas obliĝi, ke oni antaŭsupozu mian estontecon.*

*Kontraŭe, la aliuloj konas nur pri mi, miajn pasintajn jarojn; ili taksas min laŭ miaj antaŭaj agoj, kaj rigide konkretigas min kiel jam evoluintan objekton.*

*Rigardado de aliuloj estas « Infero ». Tia estas la sperto farita de la roluloj en « Malpublikeco ».*

*En tiu teatraĵo, tri personoj estas kondamnitaj, post la morto, restadi ĉiam kune, sub la rigardado de unu al la alia.*

*Hiaj pasintaj kulpoj estos tiam senĉese respекtigataj per la okuloj de la aliaj, kaj ne povos ĉesi persekuti siajn farintojn.*

*Ekzemple, Garcin, unu el la tri roluloj, faris antaŭ sia morto, malkuraĝan agon.*

Nous pouvons, en effet, émettre un tel jugement, en nous fondant sur une autre nouvelle de Sartre : « La Chambre ».

Nous y voyons une jeune femme, qui, par amour pour son mari malade, veut le suivre dans son délire, et se réfugier ainsi, en dehors de l'humain, dans l'imaginaire. — Mais, elle échouera, et elle doit avouer : « Ce n'était qu'un jeu ; pas un instant, je ne l'ai cru sincèrement. »

— Il est une autre situation, dans laquelle les êtres lucides se sentent assimilés aux existants bruts, et découvrent combien la vie est inauthentique ; — c'est lorsqu'ils se trouvent devant le regard d'autrui.

Je me considère, en effet, toujours comme un projet, comme un être qui est appelé à accomplir sans cesse de nouvelles actions, à créer perpétuellement sa vie ; d'après moi, mon passé ne peut faire présumer de mon avenir.

Au contraire, les autres ne connaissent de moi que mon passé ; ils me jugent sur mes actes précédents et me figent en un objet déjà accompli.

Le regard d'autrui, c'est l'Enfer ! Telle est l'expérience que font les personnages de « Huis Clos ».

Dans cette pièce, trois personnes sont condamnées, après leur mort, à demeurer éternellement ensemble, sous le regard l'une de l'autre.

Leurs fautes passées seront alors, sans répit, reflétées par les yeux des autres, et ne pourront cesser de poursuivre leurs auteurs.

Ainsi, Garcin, l'un des trois personnages, a commis, avant sa mort, une lâcheté.

Unu el liaj kunulinoj de karcero, Ines lin taksas nepre laŭ lia pasinta agado :

« Vi estas senenergia, vi estas senenergia, ĉar mi tion deziras,

« Mi tion deziras, ĉu vi aŭdas, mi tion deziras » (p. 166).

La homoj kiuj troviĝas en tia situacio, ekprovos tuj, per ĉiuj rimedoj, igi sian vivon tolerebla ; tamen ni baldaŭ vidos ke ili povas peti la helpon nur de malsinceraj provizoraj rimedoj, kaj cetere ne tre firmaj.

Unue, la Herooj de « Malpublikeco » serĉas la dormon, la ripozon, sed vane ; tiuj ĉi estas ne-atingeblaj.

Ĉu reciproka solrestado ? Ili ne povas ĝin toleri.

Restas al ili nur la provo de la sklavigo de la alia. Ili provos uzi ĝin kiel ilon por si mem.

Tiamaniere, Garcin kaj la tria persono Estela, volos rifuĝi en la amon ; fakte, kiam mi sentas ke mi estas amata de iu, mi ĉesas konsideri min kiel « ne pravigebla ». Mi kredas ke mi estas nepre necesa al la alia. Ĝia deziro sufiĉas, laŭ mi, doni al mi ekzist-kialon.

Sed tio estas nur mensogo, kaj la rigardado de tria persono sennualigas facile la mensogon kiun kunportas la amo.

En « Malpublikeco » ekzemple, Ines sola persono klarvida, sin dediĉos por fiaskigi la agmanieron de Garcin kaj Estela. « Mi estas tie, mi rigardas vin, miaj okuloj ne forlasos vin » (p. 156) ŝi diras al ili.

L'une de ses compagnes de prison, Inès, le juge irrévocablement sur son acte passé :

« Tu es lâche, tu es lâche parce que je le veux. Je le veux, tu entends, je le veux. » (p. 166).

Les hommes qui se trouvent dans une telle situation vont essayer, par tous les moyens, de rendre leur vie supportable ; cependant, nous allons voir qu'ils ne peuvent faire appel qu'à des expédients de *mauvaise foi*, et, d'ailleurs, fort précaires.

Tout d'abord, les héros de « *Huis Clos* » recherchent le sommeil, le repos, mais en vain ; il ne leur est pas possible de les atteindre.

L'isolement mutuel ? — Ils ne peuvent le supporter.

Il ne leur reste plus qu'à tenter l'asservissement de l'autre, dont ils vont essayer de faire un instrument à leur usage.

Ainsi, Garcin, et le troisième personnage, Estelle, voudront se réfugier dans l'amour ; lorsque je me sens aimé par quelqu'un, en effet, je cesse de me considérer comme injustifiable. Je me crois indispensable à l'autre ; son désir suffit, selon moi, à me donner une raison d'exister.

Mais cela n'est qu'une feinte et le regard d'une troisième personne met aisément à jour le mensonge apporté par l'amour.

Dans « *Huis Clos* », par exemple, Inès, le seul personnage lucide, se consacrera à faire échouer l'expédient de Garcin et d'Estelle. « Je suis là, je vous regarde, je ne vous quitterai pas des yeux » (p. 156), leur dit-elle.

*Antaŭ la fiasko de la amo, la homo provas ankoraŭ per diversaj rimedoj, eskapi de la aliaj, kaj tiamaniere, fuĝi for de si mem.*

*Ne estas eble al ni, ĉi-tie, detale paroladi pri tiu temo.*

*Ni povas noti tamen ke, la malamo mem ne sukcesos trafi la deziritan celon.*

*Estela malamegas Ines kaj celas al ŝia morto. Sed, eĉ la morto ne povas agi same kiel se la alia ne estus estinta.*

*Kontraŭe, la morto eternigas por la homo la rigardadon de la aliuloj.*

*Homo, post la morto, por ĉiam restadas en la konscienco de la aliuloj, kiel plenumita objekto fiksita en siaj pasintaj agoj. Same kiel diras, parolante pri la mortintoj, Egisto en « La Muŝoj »: « Ili ne plu estas, kaj, pro tio mem, ili fariĝis la nekorupteblaj gardistoj de viaj krimoj » (p. 48).*

*Iuj personoj do, komprenis ke la vivo tia, kia la plej grava parto el la homoj konceptas ĝin, estis ne-tolerebla.*

*Ni tamen ĉeestis la fiaskon de ĉiuj agmanieroj al kiuj ili sin turnis por fuĝi sian homan situacion.*

*Ĉar ili ankoraŭ ne sciis eltrovi la aŭtentikan vojon de la homa estaĵo.*

Devant l'échec de l'amour, l'homme essaie, encore, par différents moyens, d'échapper aux autres, et, par là, de se fuir lui-même.

Il ne nous est pas possible, ici, de nous étendre longuement sur cette question.

Nous pouvons noter, cependant, que la haine, elle-même, ne parviendra pas à atteindre le but recherché.

Estelle hait Inès et poursuit sa mort. Mais, même la mort ne peut pas faire que l'autre n'ait pas été.

Au contraire, la mort éternise pour l'homme le regard d'autrui. L'homme, après sa mort, demeure éternellement dans la conscience des autres, un objet accompli, figé en ses actes passés. Comme le dit en parlant des morts, Egiste, dans « *Les Mouches* » : « ils ne sont plus, et c'est pour cela qu'ils se sont faits les gardiens incorruptibles de vos crimes » (p. 48).

Certains personnages ont donc compris que la vie, telle que la conçoivent les hommes pour la plupart, était impossible à supporter.

Nous avons pourtant assisté à l'échec de tous les expédients auxquels ils ont eu recours, pour fuir leur situation d'homme.

C'est qu'ils n'ont pas su découvrir encore, la voie authentique de l'être humain.



### TRIA PARTO

Unu el la Herooj de Sartre, tamen, baldaŭ sin liberigos el la « viskoz-malsano », el la « malsincereco » komunaj al la plej grava parto de la homoj, kaj tiel estas alironta al aŭtentika vivo.

En « La Muŝoj », Oresto, filo de Agamemnon eksreĝo insidmortigita, alvenas iun matenon en « Argos », kaj malkovras la kolektivian « malsincerecon ». Ĉe la komenco de la teatraĵo, li estas ankoraŭ intima parto de la amaso, de la aŭtoritato, de la dogmo. Li tamen rapide sentas la deziron repreni por si sian ekzistadon, sian liberecon.

« Ni foriru, li diras, ni estas sidaĉantaj en la varmeco de la aliuloj » (p. 26).

Poste, subite okazas la krizo. Oresto estas forjetonta blindan obeemon al dio, al aŭtoritato. « Nu !... tio do estas « La Bono »? Vivi senenergie tute senenergie ; ĉiam diri : « Pardonon » kaj « Dankon », ĉu do estas tio ? » (p. 63).

Ni tuj ĉestos samtempe la eltrovon de Oresto pri lia propra libereco, kaj la anoncon de la morto de la dio.

« La justeco estas afero inter homoj, proklamas Oresto, kaj mi ne bezonas dion por tion lernigi al mi » (p. 80).

Kaj jen li estas rakontante sian konvertiĝon al Jupiter : « Estis absolute nenio plu en la ĉielo, nek « Bono », nek « Malbono », nek iu ajn por doni al mi ordonojn » (p. 101).

### TROISIEME PARTIE

Un héros de Sartre, cependant, va se dégager de la viscosité, de la mauvaise foi communes à la plupart des hommes, et va accéder à la vie authentique.

Dans « Les Mouches », Oreste, fils d'Agamemnon ancien roi assassiné, arrive un matin à Argos, et découvre la mauvaise foi collective. Il est encore, au début de la pièce, intégré au troupeau, à l'autorité, au dogme ; il ressent pourtant vite le désir de reprendre à lui son existence, sa liberté.

« Allons-nous-en, dit-il..., nous sommes en train de croupir dans la chaleur des autres. » (p. 26).

Puis, soudain, la crise survient : Oreste va rejeter l'obéissance aveugle à un Dieu, à une autorité : « Alors... c'est ça le Bien. Filer doux, tout doux. Dire toujours « Pardon » et « Merci »... c'est ça ? » (p. 63).

L'on va assister, en même temps qu'à la découverte par Oreste, de sa liberté, à l'annonce de la mort du Dieu.

« La justice est une affaire d'hommes, déclare Oreste, et je n'ai pas besoin d'un Dieu pour me l'enseigner. » (p. 80).

Et le voici, racontant sa conversion à Jupiter : « Il n'y a plus rien eu au ciel, ni Bien, ni Mal, ni personne pour me donner des ordres. » (p. 101).

Tiam, Jupiter mem konkludas : « Nu, ĉio tio estis antaŭvidita. Homo devis veni por anonci mian « krepuskon » » (p. 102).

Oresto unue sin trovos sola : « Kiel ĉio estas malplena ! Ho ! Kia granda dezerto estas, kaj ĝis nevidebleco ! » (p. 63).

Li renkontos ian malesperon ; staros la malespero alportita de la soleco de homo forlasita tute sola, sen iu ajn alia helpaĵo ol en si mem. Sed, « la homa vivo komenciĝas el la alia flanko de la malespero » (p. 102), konfesas Oresto. Tial, li tuj pretiĝas sin forlasi la vojojn de ĉiuj, por sekvisian propran vojon. « Hier aŭ ankoraŭ, mi marŝadis hazarde sur la tero ; mil kaj mil vojoj disfuĝis sub miaj paŝoj, ĉar ili estis propraĵo de aliuloj... sed neniuj el ili apartenis al mi. Hodiaŭ estas nur unu, kaj dio scias kien ĝi kondukas, sed ĝi estas mia propra vojo ! » (p. 84).

Li prenos sur sin agadon kiu estos lia agado : la insidmortigon de Egisto mortiginto de lia patro.

Li ĵus malkovris la liberecon : « Mi estas libera ; la libereco jeteĝis sin sur min same kiel la fulmo » (p. 83).

Sed, tiu libereco, kia ĝi estas ?

Por kompreni la vidpunkton de Sartre pri la vorto « libereco », ni devas unue, detale pririgardi la opinion de tiu filozofo pri la problemo de la homa ekzistado.

Sartre refutas la tradician ideon, laŭ kiu, dio estus doninta la ekzistadon al la homoj, laŭ ideo de homa naturo kiun li estus havinta en si, de ĉiam.

La homo do, ne posedus ian esencon, kiu estus antaŭinta ĝian ekziston.

Alors, Jupiter concluera lui-même : « Eh bien, tout ceci était prévu. Un homme devait venir annoncer mon crépuscule. » (p. 102).

Oreste va d'abord se trouver seul. « Comme tout est vide. Ah ! quel vide immense, à perte de vue... » (p. 63). Il rencontrera un certain désespoir, le désespoir apporté par la solitude de l'homme laissé seul, sans aucun autre recours que lui-même.

Mais « la vie humaine commence de l'autre côté du désespoir » (p. 102), reconnaît Oreste. Aussi va-t-il abandonner les chemins de tout le monde, pour suivre le sien propre. « Hier encore, je marchais au hasard, sur la terre, et des milliers de chemins fuyaient sous mes pas, car ils appartenaient à d'autres..., mais aucun n'était à moi. Aujourd'hui, il n'y en a plus qu'un, et Dieu sait où il mène : mais, c'est mon chemin. » (p. 84).

Il va assumer seul un acte qui sera le sien : l'assassinat d'Egiste, meurtrier de son père.

Il vient de découvrir la liberté : « Je suis libre ; la liberté a fondu sur moi comme la foudre. » (p. 83).

Mais cette liberté, quelle est-elle ?

Pour comprendre ce que Sartre entend par liberté, nous devons tout d'abord examiner l'opinion de ce philosophe, sur le problème de l'existence humaine.

Sartre réfute l'idée traditionnelle, selon laquelle Dieu aurait donné l'existence aux hommes d'après une idée de nature humaine qu'il aurait eue en lui de toute éternité.

L'homme donc, ne posséderait pas une certaine essence qui serait antérieure à son existence.

*Ĉiam el ekstera parto, efektive, oni atribuas al iu fundamentan karakteron. Oni diras ekzemple : « Li estas mallaborema « esence ».*

*Koncerne min, mi opinias nenion similan ; mi ne sentas ke miaj agadoj defluas el mi necese, mi ne opinias ke mia agmaniero estas pravigata per kialoj antaŭekzistantaj en mi ; kontraŭe, mi fiksas mian tutan agadon, laŭ idealaj celoj kaj ĉiam estontaj, al kiuj mi tiregas min ; mi senĉese iniciatas agi tiel aŭ tiamaniere. Mia esenco ne estas donata al mi kune kun mia ekzistado, sed ĝi estas la produkto de mia konscienco. La ekzistado antaŭas la esencon : ni atingas tie-ĉi la fundamentan ideon de ĉiu ekzistencialisma filozofio.*

*Laŭ iuj, niaj agmanieroj devenus de tendencoj kiuj estus en ni tuj de nia naskiĝo.*

*Sartre komprenigas al ni ke la devenon de nia konduto ni ne devas serĉi en fortoj kiujn antaŭe oni estus doninta al ni, sed en pura volo, en nia propra komenco en nia absoluta iniciativo.*

*Fakte, estas al ni ĉiam eble ŝanĝi la direkton de niaj agadoj, konvertiĝi.*

*Plej ofte, ni agadas senĉese en la saman direkton, ĉar la akiritaj inklinoj igas pli facila tiun agmanieron.*

*Homo havas ĉiam ŝajnigajn motivojn por persvadi sin ke ĝi posedas kvalitojn aŭ malvirtojn esence. Fakte, se ni pripensas pli profunde, ni komprenas ke ni havas kvalitojn kaj malvirtojn, ĉar ilin ni donas al ni.*

C'est toujours de l'extérieur, en effet, que l'on attribue à quelqu'un un caractère fondamental, que l'on dit, par exemple il est « paresseux » par essence. Pour moi, je ne pense rien de tel ; je ne sens pas mes actes découler de moi avec nécessité, je ne crois pas que mon comportement soit motivé par des causes préexistant en moi ; au contraire, je détermine toute mon activité, selon des objectifs idéaux et toujours futurs, vers lesquels je me porte ; je prends perpétuellement l'initiative d'agir de telle ou telle manière. Mon essence ne m'est pas donnée avec mon existence, mais elle est l'œuvre de ma conscience. L'existence précède l'essence : nous atteignons ici l'idée fondamentale de toute philosophie existentialiste.

D'après certains, nos manières d'agir dériveraient de tendances qui seraient en nous depuis notre naissance.

Sartre nous fait comprendre que la source de notre conduite ne doit pas être cherchée dans des forces qui nous auraient été préalablement données, mais dans un pur vouloir, notre propre commencement, notre initiative absolue.

Il nous est toujours possible, en effet, de changer la direction de nos actes, de nous convertir. Si, la plupart du temps, nous agissons sans cesse dans le même sens, c'est que les habitudes acquises rendent plus facile ce comportement. L'homme a toujours de bonnes raisons de se persuader qu'il a des qualités ou des défauts par essence. En fait, si nous réfléchissons plus profondément, nous comprenons que nous avons des qualités et des défauts, parce que nous nous les donnons.

*Ni libervole povas eniri ĝisfunde en alian vivon.*

*En ĉiu nova ago, temas denove pri la komenca elekto. Ĉiu ago viŝas, nenŝigas, laŭ la esprimo de Sartre, la pasintajn agadojn.*

*Libereco estas fundamente nenio alia ol la ekzistado mem. La homo estas kondamnita elekti sin senĉese.*

*Situacio en la mondo, kaj la tiel nomataj fiziologiaj kaj socialaj determinismoj povus, tute prave ŝajni limigi la liberecon. Fakte, nia situacio limigas nian liberecon, nur ĉar ĝi fiksas niajn efektivajn eblecojn; ĝi liveras la terenon sur kiu nia libereco agadas.*

*Nia situacio starigas al ni problemojn, kaj nia libereco konsistas ĝuste en la maniero solvi ilin.*

*Oftè, unu sola vojo ŝajnas proponata al ni, kaj sur ĝi ni spontane ekpaŝas.*

*Tamen, ni ĉiam havas la eblecon diri « Ne ».*

*Ekzemple, ni mem elektas la militon, ĉar ni preferas ĝin al la transkurado, al la senhonorigo, al la morto.*

*La homo konscias pri la fakto ke ĝi ĉiam estas libera, kaj ke ĝi kateniĝas libere, kiam ĝi rekonas ke ĝi estus povinta diri « Ne » en okazo kiam tio eĉ ne prezentigis al la penso.*

*La homa esenco estas do ĉiam modifebla; la homo neniam estas fiksata en sia pasinteco, sed ĝi estas antaŭ ĉio « projekto ».*

Nous pouvons vouloir nous engager tout entier dans une autre vie.

Dans chaque nouvel acte, le choix initial est remis en question; chaque activité efface, « néantit », selon l'expression de Sartre, les actions passées.

La liberté, au fond, n'est rien d'autre que l'existence; l'homme est condamné à se choisir perpétuellement.

Ce qui pourrait sembler, à bon droit, limiter la liberté, c'est la situation dans le monde, ce sont les prétendus déterminismes physiologiques et sociaux.

En fait, notre situation ne délimite notre liberté que parce qu'elle détermine nos possibilités effectives; elle fournit le terrain sur lequel notre liberté s'exerce.

Notre situation nous pose des problèmes, et notre liberté se trouve justement dans la manière de les résoudre.

Souvent, une seule voie nous semble offerte et nous nous y engageons spontanément.

Pourtant, nous avons toujours la possibilité de dire non. Par exemple, nous choisissons nous-mêmes la guerre, puisque nous la préférons à la désertion, au déshonneur, à la mort.

L'homme prend conscience qu'il a toujours été libre, et qu'il s'enchaîne librement, lorsqu'il reconnaît qu'il aurait pu dire non, dans un cas où cela ne lui était jamais venu à l'esprit.

L'essence de l'homme est donc toujours modifiable; l'être humain n'est jamais figé dans son passé, mais il est avant tout un projet.

Sartre esprimas tiun opinion, kiam li asertas ke la homo estas en « prokrasta situacio », ĝis la morto.

Tial, oni vidas multnombrajn heroojn de Sartre kiuj malantaŭeniras de la morto kiu fiksus ilin je la eterneco.

Oni povas tiel klarigi la finan parton de la Novelo « Erostrato ».

La heroo mortigis viron. Enkarcerigita kaj ĉirkaŭpremita, li intencas memmortigi tuj. Tamen, ne estas eble al li forlasi la specife homan situacion. Li volas « daŭri », « antaŭen sin ĵetadi » ankoraŭ. Li ne povas decidi sin esti rigide fiksata por ĉiam, kaj li malfermas la pordon al la policistoj.

La homo, per siaj libervolaj agadoj samtempe donas signifon al la estuloj kaj al la objektoj, kaj kreos la valoron.

Ĉar, laŭ Sartre, ekzistas neniu supera estaĵo kiu donas la ekzistadon al la objektoj, laŭ ia esenco kaj kun la celo plenumi apartan mision, ĉiu ekzistantaĵo posedas nur la signifon kiun la homo donas al ĝi.

La radiko de maronarbo, zorge rigardita de Roquentin, ne estas en si mem radiko, kaj havas, objektivite, neniun celon por plenumi.

Se oni haltas ĉe tiu stadio de pripenso, oni povas, same kiel Roquentin, havi antaŭ ĝi « naŭzon ». Sed estas necese iri pluen. La homo donis senceon al la radiko, kaj al ĝi komisiis rolon. Ĝi estas tiam provizita je iu signifo, kiun ĉiu homo devas oficiale akcepti, bone sciante tamen, ke temas pri signifo specife homa.

Sartre exprime cette opinion, en disant que l'homme est en sursis jusqu'à la mort.

Aussi, voit-on de nombreux héros de Sartre reculer devant la mort qui les fixerait pour l'éternité.

On peut expliquer ainsi le dénouement de la nouvelle : « Erostrate ». — Le héros a tué un homme ; enfermé et traqué, il va se suicider. Pourtant, il ne lui est pas possible de quitter sa condition spécifiquement humaine ; il veut « continuer », « se projeter » encore ; il ne peut se résoudre à être figé, à jamais, et il ouvre la porte aux policiers.

L'homme, par ses actes libres, va, à la fois, donner une signification aux êtres et aux choses, et créer la valeur.

Puisque, d'après Sartre, il n'existe aucun être supérieur qui donne l'existence aux choses, d'après une certaine essence, et en vue d'accomplir une mission particulière, chaque existant possède seulement la signification que lui donne l'homme.

La racine de marronnier examinée par Roquentin, n'est pas en elle-même une racine, et n'a, objectivement, aucun but à remplir. Si l'on s'arrête à ce stade de réflexion, l'on peut, comme Roquentin, avoir, devant elle, la « nausée ». Mais il faut aller plus loin ; l'être humain a donné à la racine un sens et lui a conféré un rôle. Elle se trouve alors munie d'une certaine signification que tout homme doit reconnaître, tout en sachant qu'il s'agit d'une signification spécifiquement humaine.

*Same, ekzistas en la spirito de neniu dio, ia ajn ideo de homa naturo farota. La valoro ne estas do starigita, de la eterneco. Ĝi estas kreata per la libervolaj agadoj de la homoj.*

*Elekti por esti tio-ĉi aŭ tio, estas samtempe aserti ke tio kion ni elektas estas bone. Kiam ni decidis efektiviĝi iujn agojn, ni donas al tiuj agoj, fare de nia elekto mem, valoron.*

*La homo estas sia propra legodonanto.*

*Lau la vidpunkto de Oresto, la justeco estis mortigi la mortiginton de la patro. Tiu ago prezentas do la valoron.*

*Agon libervole elektitan oni ne devas bedaŭri poste : « La plej senenergia el la mortigintoj estas tiu kiu havas konscienc-ripetojn » (p. 98) diras Oresto. Kaj li kromdiras : « Mia krimo estas fakte mia, kaj mi ĝin depostulas antaŭ la suno ; ĝi estas la kialo de mia vivo kaj mia orgojlo. Vi povas min nek puni, nek kompati » (p. 108).*

*Homo kiu valoron elektis libervole, sentis ripozon sur si-mem, la tuta prirespondeco de sia ekzistado.*

*Sed, plie, deklarante ke ago estas « bona » por li mem, li proklamas ke tiu ago estas « bona » por ĉiuj. Ĝi kreas iun bildon de la homo, kaj tiu bildo validas por ĉiuj homaj estaĵoj.*

*Tial, la prirespondeco de la homo implikas la tutan homaron. Oresto, ekzemple, elektante sian liberecon, elektas la liberecon de ĉiuj.*

De même, il n'existe dans l'esprit d'aucun Dieu, une idée de nature humaine à accomplir. La valeur n'est donc pas établie de toute éternité ; elle est créée par les actes libres des hommes.

Choisir d'être ceci ou cela, c'est affirmer, en même temps que ce que nous choisissons est bien. Lorsque nous décidons de réaliser certaines actions, nous donnons à ces actions, par notre choix même, une valeur.

C'est l'homme qui est son propre législateur.

Pour Oreste, la justice était de tuer le meurtrier de son père ; cet acte représente alors la valeur.

Une action librement choisie ne doit pas être regrettée ensuite : « Le plus lâche des assassins est celui qui a des remords » (p. 98), dit Oreste. Et il ajoute : « Mon crime est bien à moi, et je le revendique à la face du soleil ; il est ma raison de vivre et mon orgueil ; vous ne pouvez ni me châtier, ni me plaindre. » (p. 108).

L'homme qui a choisi librement la valeur, va sentir reposer sur lui la totale responsabilité de son existence.

Mais, de plus, en déclarant qu'un acte est bien pour lui-même, il déclare par là, que cet acte est bien pour tous. Il crée une certaine image de l'homme et cette image est valable pour tous les êtres humains.

Aussi, la responsabilité de l'homme engage-t-elle l'humanité toute entière. Oreste, par exemple, en choisissant sa liberté, choisit la liberté de tous.

*Li volas esti libera, sed, ĉar li atribuas al la libereco la plej altan valoron, li volas ankaŭ ke ĉiuj aliaj estu liberaj. « La homoj de Argos estas miaj homoj. Estas necese ke mi malfermu iliajn okulojn... ili estas liberaj » (p. 102).*

*Li do baldaŭ liberigos la Argianojn de la tiraneco, kiu ilin premegas, de la kolektiva hipnoto en kiun Egisto estis droniginte ilin. « Adiaŭ, miaj homoj, li diras al ili, provu vivi: ĉio estas nova, ĉi-tie; ĉio estas komencota » (p. 108).*

*Sed la loto de la libereco estos la angoro. Homo, libera kaj klarvida, konscias ke ĝi elektas sola sen povi sin turni al iu ajn « Bono » antaŭstargita. Ĝi komprenas ke ĝiaj agoj havas valoron nur ĉar al ili ĝi donas valoron; ĝi konstatas fine, ke ĝi decidis ne nur por si mem, sed por ĉiuj homoj. Tiam, la homo sentos sin ne-eviteble invadita per la morala angoro.*

*Tiel, Oresto elektis la angoron. Li forkuras, persekutata de la Erinioj, kaj diras al sia fratino, kunkrimulino de sia mortigo:*

*« Kaj la angoro kiu vin forkonsumas, ĉu vi opinias ke ĝi ĉesos iam turmenti min? — Sed, ne gravas. Mi estas libera. Trans la angoro kaj la memoraĵoj, libera kaj unuanima kun mi mem. »*

Il se veut libre, mais puisqu'il accorde à la liberté la plus haute valeur, il veut aussi que tous les autres soient libres: « Les hommes d'Argos sont mes hommes. Il faut que je leur ouvre les yeux... ils sont libres. (p. 102). Il va donc délivrer les Argiens de la tyrannie qui les obsède, de l'hypnose collective dans laquelle les avait plongés Egiste: « Adieu, mes hommes, leur dit-il, tentez de vivre: tout est neuf ici, tout est à commencer. » (p. 108).

Mais, le lot de la liberté sera l'angoisse. L'homme libre et lucide prend conscience qu'il choisit seul, sans aucun *Bien* préétabli auquel se référer: il comprend que ses actes ont une valeur, uniquement parce qu'il leur donne une valeur: il se rend compte, enfin, qu'il décide, non seulement pour lui, mais pour tous les hommes. L'homme alors se sentira inévitablement envahi par l'angoisse morale.

Ainsi, Oreste a choisi l'angoisse; il s'en va, poursuivi par les Erinnyes, et dit à sa sœur, complice de son meurtre:

Et l'angoisse qui te dévore, crois-tu qu'elle cessera jamais de me ronger? — Mais qu'importe; je suis libre. Par delà l'angoisse et les souvenirs. Libre. Et d'accord avec moi.»

## KONKLUDO

---

*Je epoko kiam ĉiu evitas ĉiuspecan prirespondecon kaj klopodas resendi siajn kulpojn sur sian temperamenton, sian edukadon, sur la socion, la utilo de la « Ekzistencialismo » estas deklari ke ĉiuj homoj estas liberaj kaj respondaj pri siaj agadoj, ke ili povas fidi nur al si mem.*

*Je epoko kiam multaj homoj rifuĝas en la revoj, la fantazioj, la esperoj, tiu filozofia sistemo rememorigas al ni ke nur valoras la agoj, ke homo estas nenio alia ajn ol tio kion ĝi efektivas.*

*Al tiu optimisma rigoreco al tiu agad-doktrino, neniu, laŭ ni, povas resti indiferenta.*

---

Noro. — La sceno 2-a (Akto III-a) de la teatraĵo « *La Muŝoj* » estis ludata de S-roj René Lech-Walter kaj Robert Guisset, (dialogo Jupiter-Oresto) - franca parto -, kaj de S-roj René Lech-Walter kaj Robert Gendre (esperanta traduko).

## CONCLUSION

---

A une époque où chacun fuit toute responsabilité et cherche à rejeter ses fautes sur son tempérament, sur son éducation, sur la société, l'intérêt de l'« Existentialisme » est de déclarer que tous les hommes sont libres et responsables de leurs actes, qu'ils ne peuvent compter que sur eux-mêmes.


A un moment, où beaucoup se réfugient dans les rêves, les imaginations, les espoirs, cette philosophie nous rappelle que seuls comptent les actes, que l'homme n'est rien d'autre que ce qu'il réalise.

A cette dureté optimiste, à cette doctrine d'action, nul homme, pensons-nous, ne peut rester indifférent.

---

Note. — La scène 2 Acte III de la pièce de théâtre des « *Mouches* » a été interprétée par MM. René Lech-Walter et Robert Guisset (dialogue Jupiter - Oreste) partie française et par MM. René Lech-Walter et Robert Gendre (version Esperanto).





Les félicitations après la Conférence

(de gauche à droite :)

M. René LLECH-WALTER  
M<sup>lle</sup> Colette LLECH-WALTER  
M<sup>lle</sup> Maguy MASSINA  
M. Pierre SERRE

Gratuladoj post la prelego

(de maldekstre al dekstre :)

S-ro René LLECH-WALTER  
F-ino Colette LLECH-WALTER  
F-ino Maguy MASSINA  
S-ro Pierre SERRE

“LA MUŜOJ” (de J.-P. Sartre)

(Akto III<sup>a</sup>. - Sc. 2<sup>a</sup>)

(Gallimard f 99)

EKSTRAKTOJ

ORESTO : *Vi estas la reĝo de la dioj, Jupiter, la reĝo de la ŝtonoj kaj de la steloj, la reĝo de la ondoj de l' maro, sed vi ne estas la reĝo de la homoj.*

JUPITER : *Mi ne estas via reĝo ! senhontega larvo. Kiu do vin kreis ?*

ORESTO : *Vi ; sed ne estis taŭĝe ke vi kreu min libera.*

JUPITER : *Al vi mi donis vian liberecon, por ke vi servu min.*

ORESTO : *Estas eble, sed ĝi ribelis kontraŭ vi kaj, pri tio, ni ambaŭ tute ne estas kulpaj.*

JUPITER : *Fine ! Jen la pravigo.*

ORESTO : *Mi ne pravigas min.*

JUPITER : *Ĉu vere ? Ĉu vi scias ke tre simil-aspektas al pravigo, tiu libereco kies sklavo vi proklamas vin.*

LES MOUCHES (de J.-P. Sartre)

(Acte III. - Sc. 2)

(Gallimard f. 99)

EXTRAITS

ORESTE : Tu es le roi des dieux, Jupiter, le roi des pierres et des étoiles, le roi des vagues de la mer.

Mais tu n'es pas le roi des hommes !

JUPITER : Je ne suis pas ton roi, larve impudente ! Qui donc t'a créé ?

ORESTE : Toi, mais il ne fallait pas me créer libre.

JUPITER : Je t'ai donné la liberté pour me servir.

ORESTE : Il se peut. Mais elle s'est retournée contre toi, et nous n'y pouvons rien, ni l'un ni l'autre.

JUPITER : Enfin, voilà l'excuse !

ORESTE : Je ne m'excuse pas.

JUPITER : Vraiment ? Sais-tu qu'elle ressemble beaucoup à une excuse cette liberté dont tu te dis l'esclave ?

ORESTO : *Mi estas nek mastro nek sklavo, Jupiter. Mi estas mia libereco ! Tuj kiam vi kreis min, de tiam, mi ĉesis aparteni al vi !...*

*Mi konfuzo komprenas min.*

*Hieraŭ, vi ankoraŭ estis vualo sur miaj okuloj, ŝtopilo en miaj oreloj ; hieraŭ fakte, mi havis pravigon. Vi estis mia ekzist-pravigo, ĉar vi naskis min por servi viajn planojn, kaj la mondo estis malnova peranto kiu al mi, pri vi parolis senĉese. Kaj poste, vi forlasis min !*

JUPITER : *Vin forlasi ! Ĉu mi ?*

ORESTO : *Hieraŭ, mi estis apud Elektro ; via tuta naturo ĉirkaŭ mi kunpuŝiĝis ; ĝi kantis vian bonon, « la perfidulino », kaj abunde disdonis al mi konsilojn. Por instigi min al la mildeco, la varmega tago moderiĝis, same kiel vualigas rigardo ; por prediki al mi la forgeson de la kulpoj (kontraŭ mi), la ĉielo fariĝis serena kiel pardono. Obeante al viaj ordonoj, jen mia juneco levis sin, stariĝis antaŭ mia rigardo, petegante kiel fianĉino kiun oni baldaŭ forlasos : mi vidis mian juncon je la lasta fojo. Sed, subite, la libereco sin eljetis sur min kaj rigidigis min ; la naturo saltis malantaŭen kaj mi ne plu havis aĝon kaj mi sentis min tute sola meze de via eta mondo, milda same kiel iu perdinte sian ombron ; kaj estis absolute nenio plu en la ĉielo, nek « Bono », nek « Malbono », nek iu ajn por doni al mi ordonojn.*

JUPITER : *...Via libereco estas nur skabio kiu jukas al vi ; ĝi estas nur ekzilo.*

ORESTO : *Vi prave diras : ekzilo.*

ORESTE : *Je ne suis ni le maître, ni l'esclave, Jupiter ! Je suis ma liberté ! A peine m'as-tu créé, que j'ai cessé de t'appartenir.*

*J'ai de la peine à me comprendre.*

*Hier encore, tu étais un voile sur mes yeux, un bouchon de cire dans mes oreilles ; c'était hier que j'avais une excuse ; tu étais mon excuse d'exister, car tu m'avais mis au monde pour servir tes desseins, et le monde était une vieille entremetteuse qui me parlait de toi sans cesse. Et puis, tu m'as abandonné.*

JUPITER : *T'abandonner, moi ?*

ORESTE : *Hier encore, j'étais près d'Electre ; toute la nature se pressait autour de moi ; elle chantait ton Bien, la sirène, et me prodiguait les conseils. Pour m'inciter à la douceur, le jour brûlant s'adouçissait comme un regard se voile ; pour me prêcher l'oubli des offenses, le ciel s'était fait suave comme un pardon. Ma jeunesse, obéissant à tes ordres s'était levée, elle se tenait devant mon regard, suppliante comme une fiancée qu'on va délaisser ; je voyais ma jeunesse pour la dernière fois. Mais, tout-à-coup, la liberté a fondu sur moi et m'a transi, la nature a sauté en arrière et je n'ai plus eu d'âge et je me suis senti tout seul, au milieu de ton petit monde bénin, comme quelqu'un qui a perdu son ombre ; et il n'y a plus rien eu au ciel, ni Bien, ni Mal, ni personne pour me donner des ordres.*

JUPITER : *...Ta liberté n'est qu'une gale qui te démange, elle n'est qu'un exil.*

ORESTE : *Tu dis vrai : un exil.*

JUPITER : *La vundo ne estas tiel grave profunda; ĝi ekzistas nur de post hieraŭ. Revenu inter ni, revenu. Vidu kiel sola vi estas; eĉ via propra fratino vin forlasas. Vi estas pala, kaj la angoro pligrandigas viajn okulojn. Ĉu vi esperas vivi? Jen vi estas konsumita de sufero nehumana, fremda al mia naturo, fremda al vi mem. Revenu: Mi estas la forgeso, mi estas la ripozo.*

ORESTE : *Fremda al mi mem, mi scias. Ekster-natura, kontraŭnatura, ne-praviga, sen iu alia ajn efika helpopeto ol al mi mem. Sed mi ne revenos sub vian leĝon. Mi estas trudita havi neniun alian ajn leĝon ol la mian. Mi ne revenos al via naturo: mil vojoj estas desegnitaj kiuj kondukas al vi, sed mi volas sekvi nur mian vojon. Ĉar, mi estas homo, Jupiter, kaj ĉiu homo devas eltrovi sian vojon. La naturo abomenas la homon, kaj vi, vi suvereno de la dioj, vi ankaŭ sentas abomenon kontraŭ la homoj.*

JUPITER : *Vi ne mensogas, kiam ili similas al vi, mi malamegas ilin.*

ORESTE : *Atentu! Vi ĵus konfesis vian malforton. Sed mi ne malamas vin. Kio estas inter vi kaj mi? Unu apud la alia, sen tuŝi nin, ni glitos same kiel du marŝipoj. Vi estas dio, kaj mi estas libera; ni estas same solaj, kaj nia angoro estas la sama. Kiu asertas al vi ke mi ne serĉis la konscienciproĉon dum tiu longa nokto? La konscienciproĉo, la dormo. Sed, mi ne plu povas havi konscienciproĉojn, nek dormi.*

JUPITER : *Kion do vi intencas fari?*

ORESTE : *La homoj de « Argos » estas miaj homoj. Estas necese ke mi malfermu ilian okulojn.*

JUPITER : *Le mal n'est pas si profond: il date d'hier. Reviens: vois comme tu es seul, ta sœur même t'abandonne. Tu es pâle, et l'angoisse dilate tes yeux. Espères-tu vivre? Te voilà rongé par un mal inhumain, étranger à ma nature, étranger à toi-même. Reviens: je suis l'oubli, je suis le repos.*

ORESTE : *Etranger à moi-même, je le sais. Hors nature, contre nature, sans excuse, sans autre recours qu'en moi. Mais je ne reviendrai pas sous ta loi: je suis condamné à n'avoir d'autre loi que la mienne. Je ne reviendrai pas à ta nature; mille chemins y sont tracés qui conduisent vers toi, mais je ne peux suivre que mon chemin. Car je suis un homme, Jupiter, et chaque homme doit inventer son chemin. La nature a horreur de l'homme, et toi, toi, souverain des Dieux, toi aussi tu as les hommes en horreur.*

JUPITER : *Tu ne mens pas: quand ils te ressemblent, je les hais.*

ORESTE : *Prends garde: tu viens de faire l'aveu de ta faiblesse. Moi, je ne te hais pas. Qu'y a-t-il de toi à moi? Nous glisserons l'un contre l'autre sans nous toucher, comme deux navires. Tu es un Dieu et je suis libre: nous sommes pareillement seuls et notre angoisse est pareille. Qui te dit que je n'ai pas cherché le remords au cours de cette longue nuit? Le remords. Le sommeil. Mais je ne peux plus avoir de remords. Ni dormir.*

JUPITER : *Que comptes-tu faire?*

ORESTE : *Les hommes d'Argos sont mes hommes. Il faut que je leur ouvre les yeux.*

JUPITER : *Malfeliĉuloj ! Vi donacos al ili solecon kaj honton. Vi diŝiros la ŝtofojn per kiuj mi estis ilin vestinta, kaj vi montrós al ili subite ilian malĉastan kaj tedan ekzistadon kiu senciele estas donata al ili.*

ORESTO : *Kial mi rifuzus al ili la malesperon kiu estas en mi, ĉar tia estas ilia sorto ?*

JUPITER : *Je kio ĝi utilis al ili ?*

ORESTO : *Je tio kion ili volos. Ili estas liberaj kaj la homa vivo komenciĝas el la alia flanko de la malespero.*

JUPITER : *Nu, Oresto, ĉio tio estis antaŭvidite. Homo devis veni por anonci mian « krepuskon » !*

JUPITER : *Pauvres gens ! Tu vas leur faire cadeau de la solitude et de la honte, tu vas arracher les étoffes dont je les avais couverts, et tu leur montreras soudain leur existence, leur obscène et fade existence, qui leur est donnée pour rien.*

ORESTE : *Pourquoi leur refuserais-je le désespoir qui est en moi, puisque c'est leur lot ?*

JUPITER : *Qu'en feront-ils ?*

ORESTE : *Ce qu'ils voudront : ils sont libres, et la vie humaine commence de l'autre côté du désespoir.*

JUPITER : *Eh bien, Oreste, tout ceci était prévu. Un homme devait venir annoncer mon crépuscule.*